Mi tamen miris, kiam la juna kattimantino frapis ĉe mia pordo. Ŝi aspektis iom pala.


"Ĉu oni jam brosis la katon hodiaŭ vespere, aŭ ĉu mi rajtas brosi lin?"

Eta ŝoko trakuris min.

"Sed, kara mia, mi vere ne povas permesi, ke vi brosu mian katon. Estas multaj studentinoj, kiuj trovas plezuron en tiu laboro; sed por vi, estos vere suferige, ĉu ne?"

"Mmm ... sed se vi permesos, mi deziras provi."

"Do, mi certe ne rifuzos al vi okazon por eble forigi timon; sed mi iom timas, ke eble vi tro postulas de vi mem. Se vi sukcesos nur duone fari la taskon - mi donos al vi tri pencojn! Jen la broso. Mi konsilas vin brosi unue lian dorson; ĉar tio plaĉas



al li kaj li certe ne gratos vin. Li iom malpli aprobos, kiam vi renversos lin! Sed se vi volas, mi helpos vin.”

Firme tiu junulino pala, kun iom kunpremitaj lipoj, kun ĝenerala aspekto streĉita, kaptis la katon kaj komencis brosi lin. Kio ajn kirlis tiun junan koron, la studentino ĝin videbligis nur per sia paleco. Ŝi brosis diligente la dorson de la kato, kiu ronronis. Poste ŝi renversis lin. Li piedbatis ŝin, uzante tiujn ŝtalajn risortojn kiuj troviĝas en la malantaŭaj kruroj de katoj kaj kunikloj. Sangoguteto ekfloris sur la mano sed la studentino rifuzis atenti. Sur la antaŭfajra mato la studentino, kiu timas tuŝi katojn, devis vere lukti, por brosi la ventron kaj akselojn de la besteto, laŭ la kataj higienaj reguloj.

Dum tempeto, mi lasis ŝin lukti. Ŝi sciu, ke tion ŝi kuraĝas fari: ia ajn ereto da memfido estas valora ekiraĵo! Sed post paŭzo, kiam mi vidis, ke ŝi obstine rifuzas timi la katon, sed ke la kato same obstine rifuzas obei manojn, kiujn ĝi certe perceptis kiel tute ne kaspertajn, mi helpis ŝin, tenante la muelantajn malantaŭajn piedojn ĝis la broso estis finita. Poste mi permesas al la kato malrenversigi; la studentino rebrosis la dorson kaj veluran kapeton glatige, ekstaris, redonis la broson al mi kaj atentis sian rekompencon.

Mi donis al ŝi ses pencojn.

“Mia kara,” mi diris, iom emociita, “vere vi ĵus faris ion kuraĝan. Mi konis multajn homojn, kiuj havis fobiojn, sed ĝis hodiaŭ mi neniam vidis unu el ili, kiu tiel montris sin pli forta ol la fobio.”

Mia studentino rektigis sin kun dignosento ĵus trovita, kun ia nova matureco. “Estas por la rifuĝintoj!” ŝi diris.

La naturo ofte premias kuraĝulojn. Post kelkaj tagoj, tiu studentino eksidis sur mia sofo, kaj mia kato, vidinte sinon pli molan ol la sofo, leviĝis, marŝis celeme al la studentino kaj eksidis, sen peti permeson, sur ŝian sinon.

“Strange nun tio tute ne ĝenas min . . . mi ne plu timas katojn.”

Jes, mia profesio donas kelkajn belajn momentojn.

MARJORIE BOULTON

Letero al Amikoj en Usono

(Roy kaj Dorothy Holland, antaŭe en Chicago, forveturis al Eŭropo, kaj sendis la sekvantan leteron al la esperantistaro usona por rakonti pri siaj spertoj.)

Karaj Geamikoj,

Dum la pasintaj du semajnoj, ni survoje renkontis tiom da esperantistoj interesaj kaj gastamemaj ke ni ankoraŭ ne atingis la sunan sudon de Eŭropo.

En Göttingen (Germanujo) gastigis nin esperanta paro (Ges-roj Michling), kiu montris al ni belegajn lumbildojn de sia vizito al la lasta U.E.A.-kongreso, kiu okazis en Bruselo.

Dum nia restado en Frankfurt (Germanujo) ni havigis nian poŝton de S-ro Warner, vicdelegito, al kiu ni antaŭ tri tagoj estis skribintaj de Göttingen, kaj kiu memorigis nin ke laŭregule necesas ke vojaĝantoj sciigu ĉiun delegiton almenaŭ unu semajnon antaŭe pri sia intencata vizito. Tion ni ne sciis (kvankam tio estas skribita en la Jarlibro); nur ke oni devas enmeti internacian respondkuponon kaj U.E.A.-membromarkon en ĉiu peta letero al delegito. Tial ke ni ne povas antaŭe sciigi la delegitojn pri nia vizito (ĉar nia nuna vojaĝo estas neplanita), ni kutime telefonas (se telefonnumero troviĝas en la Jarlibro), aŭ vizitas la hejmon aŭ laborejon de la delegitoj nur por saluti (ne por peti servon). Tamen, tiukaze ili ofte invitas nin viziti ilin poste, aŭ eĉ tiam.

Nia gastiganto en Frankfurt, S-ro Salzmann, multe helpis nin. Li agis kiel tradukanto kiam ni vizitis familion kiu povis skribi angle sed ne multe paroli; li havigis por ni porteblan sonbendigilon (aŭ magneto fonon) je 20%a rabato; li gvidis nin tra la belegaj montoj apudaj; kaj per li ni vizitis du germanajn hejmojn (unu, de liaj gepatroj en la vilaĝo Montabur Westermwald, kaj la alia de esperantista paro juna, Ges-roj Selten), kaj renkontis tri esperantistojn en Wiesbaden (S-ron Schönrich kaj D-ron Kleemann kaj filo).

En Karlsruhe (Germanujo) ni vizitis S-ron Helfers, kies librejo enhavis pli ol tri bretojn da esperantaj libroj; kaj en Freiburg nia gastiganto, S-ro Bonte (kies edzino kaj filino ankaŭ parolis esperante) rekomendis al ni vojaĝon tra la fama Nigra Arbaro ĝis Basel (Svislando). Danke al li, kaj al la brilanta suno, ni faris belegan veturadon tra montetoj kies krutaj flankoj estis kovritaj de malhelaj abioj (tial la nomo 'Nigra Arbaro') inter kiuj troviĝis la flavaj kaj ruĝaj folioj de aliaj arboj. La valoj (kaj kelkfoje la flankoj de la montetoj) enhavis verdajn paŝtejojn kiuj similis al golf-ludejoj, kaj de loko al loko, farmdomojn kun tre krutaj tegmentoj.

La 14-an de oktobro ni eniris Francujon. Ĉe la landlimo mi penis fotografi la doganistojn, sed ne povis pro iliaj fortaj gestoj neaj (la kialon de tio mi ne eltrovis).

En Besançon ni renkontis du ĉarmajn esperantistinojn, F-inon Renée Correy, kiu estis redaktorino de la urba universitato (dum rigardo de 800-jaraĝa katedralo ŝi esperanten tradukis el la franca lingvo por ni); kaj S-inon Trézorier (direktorino de kinder-

garden), kiu invitis nin al sia loĝejo por meztagmanĝo, dum kiu ni ricevis bongustegan fruktan sukton anstataŭ vinon. Ankaŭ ni vizitis ŝian esperantan klason, kies membroj ĉiuj sendis al vi salutojn.

Nun ni restas kelkajn tagojn en Lyon, kie ni dufoje vespermanĝis kun Ges-roj Eyssautier, tre afablaj esperantistoj, per kiuj ni lernis ke francaj infanoj restas en la lernejo ok horojn ĉiutage krom dimanĉe. Hodiaŭ vespere ni ĉeestos kunvenon de la esperanta grupo de Lyon.

Bondezirojn al vi ĉiuj de

Roj kaj Doroteo Holland

“GRAINS IN THE WINDS”

Teachers are requested to take part in the program of exchange of interesting writings and drawings made by their pupils about their life: home, neighbourhood, town; enjoyments and troubles; games, parties; customs in our country, folk lore and legends. The children make drawings, paste-up pictures of flowers, stamps, photos, etc. Everything non-political is permitted in the writings.

Interested teachers knowing Esperanto should include the following information in their letter to the center of the program: Mr. Mrs. or Miss; name; profession; address; name and address of the school, age of the pupils, boys and/or girls; GRAJNOJ EN VENTO, Marcel Erbeta, Bienne-Biel 7, Switzerland. If a good deal of interest is created in your locality, will you be willing and able to administer another circle?

Rules for the children's materials to be sent:

- 1) Size of paper sheets - 21 X 29.7 cm.
- 2) Twenty copies of each child's material

are to be made, to be sent to the center in Switzerland, the first of March, of June, and of November. After the materials from 10 countries have been received, they will be bound together in ten albums and returned to the schools, as an album unique in all the world, valuable, cultural and the best means of winning sceptics over to our cause.

Finances to pay the expenses of the central address are obtained by the co-workers sending a minimum fee of three international reply coupons (value 8¢, price 13¢) every March, June and Nov. A dollar bill would be best, because you would save yourself 17¢, yet still be donating 22¢ above the face-value of the nine coupons.

All material sent to the Swiss center must bear pupils' name, address of the school and of the teacher, to enable them to carry on further communication, if desired. The three coupons are to be sent with each set of materials. Please correspond only in Esperanto.

Letero al la Redaktoro

En via lando oni publikas gravan Almanakon nomitan 'INFORMATION PLEASE', vaste vendatan ne nur en Usono, sed ankaŭ en Hispanameriko.

En siaj paĝoj - pli ol 500 - oni pri-traktas diversajn aferojn: Geografio, Politiko, Sportoj, ktp., sed en la statistika sekcio pri popoloj kaj lingvoj oni nenion diras pri Esperanto; eble oni forgesas aŭ malkonas nian lingvon.

La aŭtoro volonte petas al la legantoj sendi al li novajn informojn pri ĉiu temo, do, mi sugestas alvokon al la Esp. legantoj, por sendi al tiu Almanako informojn pri Esperanto: la mondaj kongresoj, libroj, publikajtoj, kvanto da homoj parolantaj la lingvon, ktp. Tio eble povus helpi nian movadon. La adreso estas:

'Information Please' Almanac,
444 Madison Ave., New York 22, NY
Samideane via

Victor M. Gonzalez

Estimata Redaktoro:

Mi gratulas vin je via elekto al la nova posteno, tre grava por nia afero. Mi dankas vin, ke vi malŝarĝis min de miaj troaj laboroj. Mi esperas ke via nova vidpunkto kaj via kapablo verki pri niaj aferoj levos la Revuon al multe pli alta nivelo ol mi povis atingi. Mi estas certa ke la Revuo nun estas en tre kapablaj manoj.

Samideane via

F.R. Carlson, eksredaktoro

DEZIRAS KORESPONDI

Jan Perina, Jenštejská 1, Hl. kolej, Prague 2, Czechoslovakia. Studento, deziras interŝanĝi p.m. kaj p.k., korespondi pri sportoj, dancmuziko, literaturo.

Francisko Ramirez, Avenida Meridiana 175-2º, Barcelona (13), Spain. Deziras interŝanĝi p.m. kaj unuataĝajn kovertojn.

Ivan Ĉunĉev, Str. Ribarska 19, Vidin, Bulgaria. Dentisto, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Miroslav Mojžišek - Ulice Odboje 340 Vratimov, Czechoslovakia, 41 jarulo, invalido, denaska paralizulo. Kolektas alumetetiketojn.

Zsigó Janós - Tatabánya II, Arpád II Hungaria. 16jarulo, gimnaziulo, volas interŝanĝi poŝtkartojn kun usonanoj.

Universala Esperanto Asocio

estas monda organizo de Esperantistoj, konsistanta el la naciaj asocioj kaj individuaj membroj. Ĝi publikigas la monatan gazeton 'Esperanto', jarlibron (en du partoj), kaj funkciigas reton de deligitoj tra la mondo. Ĉiu aktiva esperantisto bezonas esti individua membro de U.E.A. Kotizoj por 1961:

por simpla membro kiu ricevas la jarlibron:	\$ 2.25
por membro kiu ricevas la gazeton kaj jarlibron:	\$ 4.50
por subtenanta membro:	\$ 6.75
por dumviva membro:	\$ 90.00

Sendu kotizojn al, kaj petu informojn de Donald E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, California.

... Al Ĉio ...

“Ciganino, prenu la kartojn,
pri sorto vi mia ilin demandu! -
Vi ridas? - Via buŝo sendenta
ne pli al mi nur minacu....”

Eble ŝi min ektimis....

Karton unuan ŝi levis:

Nigran rĝinon miaj okuloj ekvidis...
kiam la duan karton sur tablon ŝi metis,
apud rĝino kora junulo ekrestis....

Karto la tria estis
mort-aso!

Ciganino min akre rigardis,
en ŝiaj okuloj estis demandoj -
karton la kvaran ŝi montris,
karto plej lasta estis
kor-damo!

“Neniam vi estos feliĉa,
nenie vi trovos ripozon,
eĉ en la amo vi estos trompota -
lasu vi ĉion, iru en mondon,
eble nur tiel vi trompos la morton,
kiu al vi estis jam anoncota!”

Mi strange ekridis,
mi prenis kor-damon,
mi ĝin diŝiris
kaj iris sur straton,
laŭ strato en mondon -

En mondo vastega
... al ĉio ...
mi ridis

Damjan Vahen-Svetinov

Vizito de D-ro Kuwahara al Chicago

Vendrede, la 4an de novembro, al-
venis Ĉikagon D-ro Kuwahara, direktisto
de la Registara Instituto por Ĥemia Esplo-
rado en Osaka, Japanio. Du esperantistoj
el la Esperanto-Societo de Ĉikago renkon-
tis lin ĉe lia hotelo, kaj, kun alia japana
sinjoro, parenco de D-ro Kuwahara, ĉiuj
veturis al la hejmo de S-ino Martha
Zocchi por bongustega vespermaĝo.
Poste, ĉiuj veturis al la domo de S-ino
Julie Regal, kaj tie D-ro Kuwahara mon-
tris lumbildojn al anoj de E.S.Ĉ., kaj
interesege parolis esperante pri ili. Poste
ĉiuj mangiŝ kaj babilis unu kun la alia kaj
kun D-ro Kuwahara, grandparte esperante.
Je la fino de la vespero, ĉiuj ŝajne akordis
ke Esperanto ja estas bonega interkompre-
nilo.

David K. Jordan.

NOVAJ LIBROJ

Animo Prisma, de Sylla Chavas
112 p., Rio de Janeiro: Kultura Kooper-
ativo de Esperantistoj.

Esperanto Junulkurso. 92p.
Represita de la Kultura Kooperativo.

Fermentario, de Carlos Vaz Fer-
reira. Tr. Manuel Fernández Menéndez.
254p. Montevideo: Urugvaja Esperanto
Societo.

La Kunmetitaj Verboformoj
de Teo Jung. 55p. Scheveningen: Heroldo
de Esperanto.

Kantoj Por la Paco, de Canko
Murgin. 44p. Deje (Svedio): Sveda
M.E.M.-sekcio.

Ĉina Antologio, 1949-1959.
412p. Peking: Ĉina Esperanto-Ligo.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

“Estis tre nebula tago en 1908, kiam William D. Boyce, Usona eldonisto, estis serĉanta adreson en London. Tuttage estis kovrata la urbo per densa nebulo. Stratlumilaron oni funkciigis antaŭ la tagmezo. Jam noktigis, kaj estis preskaŭ neeble al la fremdulo trovi sian vojon.

S-ro Boyce miris, kiam el la nebulo knabo proksimiĝis kaj demandis, ĉu li povas helpi. Tiu rakontis al la knabo pri tie, kien li volis iri, kaj plu miris, kiam la junulo salutis al li kaj diris, ‘Venu kun mi, sinjoro.’

Atinginte la adreson Boyce manoni enpoŝigis kaj proponis al la junulo ŝilingon. Li pli ol iam antaŭe miris, kiam ĝin malakceptis la knabo.

‘Dankon: ne sinjoro! Mi estas skolto. La skoltoj ne akceptas dankmonon pro bonfaroj.’

‘Bonfaroj? Skoltoj?’ demandis S-ro Boyce. ‘Kiu estas la skoltoj?’

La knabo klarigis al li, kaj montris la vojon al la oficejo de B-P proksime. Tie lernis S-ro Boyce pri la skoltoj, kaj li decidis, ke Usonaj junuloj ŝatus la grandan skoltludon.

La 8an de februaro, 1910, S-ro Boyce kaj aliluloj, kiuj interesiĝis pri la afero, formale korporaciigis la Usonajn skoltojn, la Boy Scouts of America. Jen kiel la skoltismo komenciĝinte en Sud-Afriko kiel ideo por eduki junulojn en la subĉielartoj venis Usonon per Anglujo pro bonfaro.”

Baldaŭ post tio Prezidanto Wilson kaj aliaj famkonataj viroj tiam ~~forvore~~ subtenis la novan movadon por la junularo bone sciante kaj publike deklarante, ke la sindisciplinigitaj junuloj hodiaŭ estos la civitanoj kaj estroj de nia lando morgaŭ.

En apartaj tranĉeoj en Francujo dum la Unua Mondmilito du Britaj soldatoj multe pripensis skoltan organizaĵon kies programo estus pli internacia ol iu tiam ekzistante en la skolta movado. Kiam komunikado estis ebla, ili korespondis pri iu organizaĵo kiu kunigus skoltojn ĉirkaŭ la mondo. Ĉu ili iam legis artikolon en ‘La Revuo’ redaktita de L. L. Zamenhof pri Esperanto kaj la Skoltoj aŭ simple rekonis la bezonon por organizaĵo, ne certas, sed ili jam daŭris korespondi serioze. En 1918 la du soldatoj A. W. Thomson kaj J. W. Leslie kun alia fondis la SKOLTA ESPERANTISTA LIGO-n. Dum la skoltismo kreskis, ankaŭ kreskis la nombro da skoltaj esperantistoj kaj baldaŭ la fondintoj trovis Francan pastron, S-ro Rambaux, kiu dum la fruaj jaroj de la Ligo eldonis skoltan gazeton, LA SKOLTA HEROLDO. La skolta gazeto baldaŭ atentigis la estrojn de la Esper-

antomovado kaj la estroj de pluraj Eŭropaj skoltaj asocioj.

La Ligo ekfloris de 1930 tra 1941 sub la gvido de forta centra komitato konsistanta el Norman Booth el Huddersfield, la sekretario; D. H. Davis el London, la kasisto; kaj Paul Blaire el Liverpool kiu starigis la kapitalan konton, la konto hodiaŭ ebligas skoltajn eldonaĵojn. Grandegaj kontingentoj de skoltaj esperantistoj evoluis en Britujo, Francujo, Germanujo, kaj Ĉekoslovakio, kaj SEL-tendaroj organiziĝis en multaj landoj tra Eŭropo, ĉe Ĵamboreoj, kaj aliaj okazaĵoj. La nombro da skoltaj membroj eĉ en Usono, tiam estrataj de William Fazel el Texas, grandiĝis, prok. 300. Dum tiu periodo S-ro Rambaux ĉesigis la presigon de LA SKOLTA HEROLDO, kaj tuj Douglas Murphy redaktis novan, nomitan ‘LA SKOLTA BULTENO.’

Milito okazis en 1939. La oficistoj en la multaj landoj devis aliĝi al la armeoj, kaj batali. La Skolta Esperantista Ligo suferis tre serioze same kiel aliaj organizaĵoj. Charles Bardsley tamen konservis la konton kaj vivon de SEL dum tiuj militjaroj kaj servos sian lastan jaron kiel la Sekretario de la Ligo. Ŝajnis ke post tiu granda milito ke SEL kondamniĝis al morto, sed S-ro Bardsley revivigis ĝin. Sub la forta gvido de L. J. Van Gulck el Antwerpen, Belgujo komence de 1948, la Ligo malrapide gajnas gravecon denove inter skoltoj. Novaj kaj agemaj skoltaj kontaktoj okazis en multaj landoj kaj hodiaŭ estas agentoj en pli ol 20 landoj, kun pluraj kreskaj landaj Sekcioj; tio indikas fortan novan intereson inter mondanimaj skoltoj kaj skoltestroj. En 1958 la internacia skolt-oficejo (Boy Scouts International Bureau) salutis la Skoltan Esperantistan Ligon pro ĝiaj 40 jaroj da ekzisto, kaj estis bona afero por tiu Ligo.

En Usono post la Mondmilito agentiĝis George Falgier kies skolta gazeto ESTU PRETA restas klasika skolt-esperantista literaturo. Poste alia agentiĝis sed nenion faris por daŭrigi tiun programon. En 1957 agentiĝis skoltestro, kiu dum sia deviga armea servado fondis la Usonan Sekcion de SEL kun helpo de multaj Esperantistoj. Hodiaŭ la Sekcio proksimiĝas al 100 membroj kaj estas estrata de stabo de junaj skoltoj kaj skoltestroj dediĉitaj al la du movadoj. La Sekcio prizorgas taskojn de publikeco (sub Robert W. Rapp), preparas informon por gruplernado de Esperanto (sub Thomas Haxby), pritraktas novajn internaciajn skoltajn programojn (sub Kenneth M Hunter), kaj eldonas Sekcian bultenon, la USONA SKOLTA REVUO (sub Allan E Fineberg).

C. Stanley Otto

LA MOVADO EN USONO KAJ KANADO

La Nordkalifornia Asocio de Esperanto-Instruistoj kongresis la 8an de oktobro en San Francisco. Dekses personoj ĉeestis. Prelegis Ida Belle Craig, reveninta el la Universala Kongreso en Belgio, kie ŝi oficiale salutis por Usono. Dum ŝi estis en Bruselo, ŝi partoprenis la kurson de la Ĉe-Instituto. La kalifornia kunveno ĝuis demonstracion de la Ĉe-teknikoj. La venonta kunveno okazos la 3an de decembro, en Burlingame.

La klaso por infanoj en Sunnybrae School, San Mateo, California, komenciĝis en oktobro kun 13 gelernantoj. Instruas la klason Lavina Parsons, uzante kiel libron 'Esperanto Por Infanoj'. La infanoj rapide progresas, kaj la plej lertaj komencas legi 'La Verda Lakto' de Andreo Ĉe.

Roy kaj Dorothy Holland, kiuj sendis leteron presitan aliloke en ĉi tiu numero, nun estas en Eŭropo. Sur la ŝipo transiranta la oceanon Dorothy Holland instruis sukcesan Esperanto-klason, kiun oni anoncis ĉiutage per la laŭparoliloj.

Jam menciita en la pasinta numero estas la nova movado, Voĉo de Virinoj, kiu utiligas krom la anglan lingvon ankaŭ esperanton. Eĉ sur la titolpaĝo de la duonmonata gazeto, oni presas la esperantan nomon de la movado samgrande kiel la anglan. Inter la honoraj subtenantoj de la movado estas S-ino Lester B. Pearson, kaj kvin senataninoj, k.c. La movado 'alvokas la virinojn de Kanado protesti

kontraŭ milito aŭ minaco al milito kiel rimedo por solvi mondkonfliktojn; alvokas la virinojn de Kanado montri vojon al la virinoj de la mondo en tiu protesto.'

Laŭ informoj de la Komitatanino por Internacia Korespondado (neangla sekcio) s-ino Vilma Eichholz, la movado kreskas nun je ĉ. 100 membroj ĉiusemajne kaj havas nun jam pli ol 1200 membrojn. Lokaj grupoj fondiĝis en multaj urboj, kiuj i.a. havas la taskon entrepreni tutmondan korespondadon. Esperantlingvaj demandiloj por internacia korespondado jam estas presitaj kaj kun aliaj informoj en esperanto haveblaj de Vilma Eichholz, Esperanto Domo, Oakville, Ont., Kanado.

Mencioj pri Esperanto aŭ pri agado de Esperantistoj aperas en diversaj ĵurnaloj. Lastatempe ni informiĝis pri mencio pri la ELNA-Kongreso 1961 kaj la esperantoklasoj de F.R. Carlson, la Seattle Times de la 20a de oktobro; dua anonco pri la klasoj, en la Seattle Times de la 3a de novembro; dukolona artikolo pri kunveno de la Peninsula Esperanto-Klubo en la San Mateo Times, de la 1a de oktobro; kaj pri la organiziĝo de la Esperanto-Klubo de Lehigh Valley, en la Allentown Morning Call de la 18a de septembro.

La Ĉe-metoda kurso ĉe la universitato en Hamilton, Ontario, komencis kun nur ses personoj, sed intertempe pli ol duoblighis, kaj nun havas jam 13 gelernantojn. Paralela kurso kun 6 lernantinoj ankaŭ gvidata de Vilma Eichholz okazas en la Esperanto Domo, Oakville, Ontario.

LOCAL ADDRESSES

The Review lists, without charge, addresses of local Esperanto groups or of Esperantists who want local contacts to form new local groups. It is not necessary that the members of such groups be members of the League. ELNA exists for the purpose of helping all who want to promote Esperanto. If you want advice on forming a local club or study group, write to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa.

In case of a group representing some religious, political or other special interest, please state affiliation or special interest. We make no judgment, and accept no responsibility, concerning Esperantist special interest groups but will list addresses (if in North America) so that persons of similar interests may find congenial groups.

ELNA Membership and Organization Committee, 3122 Silva St., Lakewood, California.

Greenfield Esperanto Committee, 63 Congress St., Greenfield, Mass. PR 3-7031.

James C. Keating, 323 Nottingham St., Springfield 4, Mass. ST 8-8481.

Frances Leshner, 4 West 28th St., New York 1, N. Y. MU 4-6384.

Esperanto Club of the Lehigh Valley, 701 Lechauweki Ave., Bethlehem, Pa. Corresponding Sec.: Rene Oehler.

Esperanto Study Group, Y. W. C. A., Meadville, Pennsylvania.

Floyd A. Clarke, 1723 Illingsworth Ave., Allentown, Pennsylvania.

K. M. Whitten, 3933 Baltimore Ave., Philadelphia 4, Pennsylvania, EV 2-3959.

Mrs. Joey Przybilla, P. O. Box 685, Whitehall, Wisconsin.

Esperanto Society of Chicago, c/o H Tobusch, 55 E. Washington, Chicago, Ill.

Tom Haxby, 724 W. Gordon, Harrison, Arkansas.

Esperanto Coterie of Texas, P. O. Box 805, Houston 1, Texas.

Seattle Esperanto Society, 3231 West 62nd St., Seattle 7, Washington.

Esperanto Society of San Francisco, 110 Cardenas Ave., San Francisco 27, California, Ju 4-2198.

Pasadena Esperanto Class, YWCA, 78 N. Marengo Ave., Pasadena, Calif.

Peninsula Esperanto Club, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

Esperanto Society of Sacramento, 5631 Balboa Circle, Sacramento, Calif.

Esperanto-Klubo de Los Angeles, 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, California.

Esperanto-Societo de San Diego, P. O. Box 6215, San Diego 6, California.

Napa Esperanto Club, c/o Martha Walker, 2846 Monticello Rd., Napa, Cal.

Palo Alto Esperanto Class, Room 39, Palo Alto High School, 50 Embarcadero Rd. Palo Alto, Cal. Meets Wed. at 7:30 p. m.

John Clifford, 750 47th Ave., Capitola, California.

Oakville Esperanto Club, Esperanto House, Oakville, Ont. Canada. Ta2-9330

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Canada.

Calgary Esperanto Studrondo, YWCA, Calgary, Alberta, Canada.

ELNA youth section: Charles Powell, Route 1, Box 92, Winauma, Florida.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, U.S. representative George Falgier, 3622 N. Market St., St. Louis 13, Missouri

Skolta Esperantista Ligo, U. S. Section: C. Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, New Jersey.

Internacia Esperanto Muzeo en Wien,
U. S. representative, William E. Baff,
610 C St. S.E., Washington 3, D.C.

Internacia Naturista Fakgrupo Esper-
antista, c/o L. Heilberg, 447 Cole St.,
San Francisco 17, California.

Esperanta Libro-Servo, 2222 Crest
Drive, El Cajon, California.

Esperanto League Book Service,
Middleton, Wisconsin.

OFFICERS of ELNA

President - David B. Richardson,
RFD Box 81, Eastsound, Washington
Vice-President - Charles E. Peterson
8314 E. Florence, Downey, Calif.
Secretary - Conrad Fisher, 808 Ste-
wart St., Meadville, Pennsylvania
Treasurer - Adrian Hughes, 476 S.
Bailey Ave., Hillsboro, Oregon

EXECUTIVE BOARD

Chairman - Armin F. Doneis, Sr.,
P.O. Box 105, Pharr, Texas
Members -
Howard G. Borden, 865 Lower Ferry Road,
Apt. 103, Trenton 8, New Jersey
Mary Gibson, P.O. Box 409, Riverdale,
California
Thomas A. Goldman, 7008 Milwood Rd.,
Bethesda 14, Maryland
Wm Harmon, 3211 Silva St., Lakewood,
California
John L. Lewine, 50 Overlook Terrace,
New York 33, New York
Catherine Schulze, 410 Darrell Road,
Hillsborough, California
H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave.,
Spokane 32, Washington
Martha Walker, 2846 Monticello Road,
Napa, California

AGOJ KAJ DECIDOJ DE LA ELNA ESTRARA KOMITATO

La Estrara Komitato elektis Armin
Doneis por servi kiel ties estrarestro.
(61-I) Aprobis la nomigon de Donald
Broadribb kiel redaktoro de Nord-Amerika
Esperanto-Revuo.

(61-II) Aprobis akcepton de invito al
ELNA kongresi en Seattle, Washington
de la 7a ĝis 9a de julio, 1961, kun ne-
formala interkonatiĝo vespere de la 6a.
La loka kongresa komitato estos estrata
kaj gvidata de prezidantino Helen Higbee
kaj sekretario Ferd Carlson.

(61-III) Rajtigis la ELNA-kasiston pagi ne
pli ol \$300 por la tutaj kostoj de la no-
vembro-decembro-numero de Nord-Ame-
rika Esperanto-Revuo.

Dua Volumo ESPERANTOLOGIO

*Internacia revuo por la lingvistiko kaj
bibliografio de Esperanto.*

La reapero de "Esperantologio" es-
tas grava kultura evento por la tuta
Esperantista movado. La unua kaj-
ero jam aperis. La tuta dua volumo
kovros proksimume tri jarojn.



La abonprezo por la dua volumo en
Usono estas \$6.00. La jam komplet-
igita Volumo I havebla je \$5.00.

La usona peranto estas
R. C. Marble, Box 4127,
Van Nuys, California.

*Sendu monon kaj abonojn NUN
al la peranto.*

FOR THE STUDENT OF ESPERANTO WE SUGGEST:

Step by Step in Esperanto, by M.C. Butler. 280pp., cloth bound.

An unconventional textbook especially suited for home study. . . . \$2.50

Teach Yourself Esperanto, by Cresswell and Hartley. 205pp.

Utilizes the grammatical approach. \$2.75 in the U.S.A., \$1.85 in Canada.

With 7" (2 hours) tape recording of the Esperanto text \$9.95

Essential Esperanto, by W. A. Gething, 128pp., cloth bound .. \$2.80

Esperanto Pronunciation Record (45 r.p.m., with text). . . . \$1.50

Pronunciation-Exercise Tape (3 3/4 i.p.s. - 2 hours, with text)\$8.90

Life of Zamenhof, by E. Privat. Biography of the author of Esperanto and history of the origins of the Esperanto movement. \$1.00 (Esperanto edit. \$1.25)

ORDER FROM: Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin.

or: Esperanta Libro Servo, 2222 Crest Drive, El Cajon, California

or: Floyd A. Clarke, 1723 Illingsworth Ave., Allentown, Pennsylvania

or: Esperanto Press, Oakville, Ontario, Canada.

Sender:

ESPERANTO PRESS

Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed

